



Estrara Komunikado EKO 2018-19 sendita el Budapeŝto, la 9an de julio..

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilanoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

AMO jam jubileas – tempo por retro-rigardo

Universalaj Kongresoj bezonis 110 jarojn por atingi sian centan jubileon. La AMO-programo jam atingos sian kvindekan jubileon en malpli ol 4 ½ jaroj. Pli precize, 50 seminarioj en 52 monatoj. Aldonite, vi trovos du PDF-dokumentojn, la unua kovras la jarojn 2014 kaj 2015, la dua la jarojn 2016 – 2018. Tiu apartigo zorgas, ke neniu dokumento estas tro peza.

Temas esence pri foto-raportaĵoj pri elektitaj seminarioj. Post kelklinia enkonduko la tekstoj limiĝas al bildklarigoj. Tion suplementas tabeloj pri ĉiujaraj seminarioj resumoj kaj notado de la enhavo de revuo *Esperanto*, kiu akceptis regulajn informojn pri la AMO-programo. Fine aperas laŭkontinenta, laŭjara statistiko, plie tema resumo kaj du mapoj.

Ne nur jubilado pravigas la kompilon, ni zorgas ankaŭ pri la konservado de la historio de la fenomeno de la seminarioj. Ni sendas al vi sveligitajn versiojn de la dokumentoj. Laŭpete ni povos sendi al vi la pli korpulentajn dokumentojn, kiuj permesas pli altan bildo-kvaliton; temas pri 3 kaj 6 MB.

AMO 48 Ĵus okazis – ni survojas al la kvindeko!

AMO/KTF/NASK estas la plej granda evento en Nordameriko, kun 76 partoprenantoj kaj 10 aldonaj organizantoj. La grupo ankaŭ montras grandan diversecon rilate al aĝo, sekso, intereso, fakoj, etnokulturaj fonoj.

La programo por la unua vespero de KTF/AMO/NASK 2018 estis sukcesa Diskut-rondo pri La Reta Elsendo de filmetoj. Ĉirkaŭ 40 personoj ĉeestis la 90-minutan prezentadon de Tomaso Alexander, Charlotte Burton, kaj Alekso Miller. Ili regalis nin per multaj interesaj detaloj, spertoj, utilaj sugestoj, kaj opinioj pri la kreado de filmetoj en Esperanto. Demandoj de la spektantoj, de Derek Roff, kaj de Alena Adler iluminis plurajn flankojn de la temo.

Vi trovos fotojn je la subaj ligoj, parte de la bonveniga sesio, kaj parte de la Diskut-rondo.

<https://www.dropbox.com/sh/6rd38yo7zxs8bnh/AABAMuTvENvH6NJUHaamFg7Wa?dl=0>

<https://www.dropbox.com/sh/ocpbitq8y3r4955/AADBE15Wodi8PIkoPUOJ93tva?dl=0>

Uzbekia Esperanto-Asocio registrita ĉe la Ministerio de Justico

Kun granda ĝojo mi volas informi vin ĉiujn pri tio ke venis la tago, kiun ni atendis dum multaj jaroj. Finfine nia - Uzbekia Esperanto-Asocio estis agnoskita kaj registrita ĉe la Ministerio de Justico de Uzbekio. Efektivigis nia delonga revo.

Nia sekva tasko estas membriĝi al UEA kaj por tio ni esperas je via atento kaj subteno. UzEA tuj planas okazigi ĉi-oktobre en Taŝkento E-forumon pri komerco kaj turismo kaj samtempe okazigi ĉiujaran tradicion E-festivalon kaj poste gastigi Azian Kongreson kaj eĉ UK-on. Nia opinie nia sunriĉa kaj ĉarma lando konvenas por okazigi tiujn internaciajn aranĝojn. Niaj antikvaj kaj eterne junaj fabelaj urboj Taŝkento, Samarkando, Buĥarao kaj Ĥivao pli kaj plibeliĝas kaj la fluo de turistoj daŭre kreskas. Ni elkore invitas vin. Vi povas veni dum la tuta jaro kaj ni kun plezure bonvenigos vin.

Gafur Mirzo, prezidanto de UzEA

FEB nomumas gvidan konsilion cele al landa kongreso decembre

La laborgrupo starigita en la 4a Sud-Azia Seminario (SAS) en Bengaluru en oktobro 2017 sukcesis kunveni en Pune fine de junio. Ili transformis sin al konsilio kaj aldonis membrojn. Ili kreis bone protokolitan laborplanon por la plia evoluigo. Ni raportos pli detale pri tio en la sekva EKO kaj aldonos tiun laborplanon por la reaktivo de FEB. Ni ne faros tion nun, pro la nunaj iom korpulentaj aldonadoj pri AMO 50. La plano estas organizi Baratan Kongreson en decembro en Tirupati, kie eblos elekti veran estraron por la landa asocio en tiu gravega lando. La mapo orientigas vin pri la urboj, kiuj ludis kaj ludos rolon en la reconstruo, ĉiuj en la sudo de la sub-kontinento.



La Eŭropa bulteno daŭre informas

Trovebla ĉi tie: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>.

El la enhavo:

1. Nederlandaj lingvoj (Raŝić)
2. Placo de gefratoj Dazini en Massa
3. Somera programo en Greziljono
4. La 20-a E-konferenco de Alp-Adria regiono en Bjelovar (Kroatio)
5. Novaĵoj de Asocio de verduloj esperantistoj
6. Kvara parto el la libro "identecoj" (Tiŝljar)

Kresko el Kroatio

Ĝuu la 7-an numeron de "Kresko"; libere elŝutu ĝin ĉe: www.esperanto-bjelovar.hr

Afrika Bulteno – regule kaj informplene

La nova numero de la afrika bulteno legpretas en la PDF-dokumento per la ligilo:

<[http://www.esperanto-afriko.org/Esperranto%20en%20Afriko%20%20n-ro%2035%20\(1\).pdf](http://www.esperanto-afriko.org/Esperranto%20en%20Afriko%20%20n-ro%2035%20(1).pdf)>.

Ankaŭ MONA bultenas -- Turkio prenas gvidan rolon

Mi flugigas al vi la trian numeron de "MONA Informado Bulteno" el la regiono: Mez-Oriento kaj Nord-Afriko.

La Bulteno enhavas novaĵojn el tiu regiono jam publikigitaj en la retejo:

<https://monainformado.wordpress.com/>

Ĉiuj povas libere aboni al la retejo lasante sian retpoŝt-adreson en la supro de la dekstra menuo. Tiel la abonanto ricevos atentigojn pri novaj blogaĵoj.

Vasil Kadifeli

Esperanto Esperanto Esperanto

اسپرانتو اسپرانتو اسپرانتو

MONA

Esperanto Esperanto Esperanto

EKO Tempolinio Komisiono Kunvenoj Informilo MONA Bulteno Pri ni Kontaktoj

— Plej muzika Landa Kunveno en Israelo Esperanto Günü —

MONA Bulteno
Afiŝita en 08/07/2017

Por elŝuti la malnovajn numerojn de nia bulteno bonvolu klaki sur la ligiloj suben kaj poste en la malfermita retpaĝo (Mega.nz) klaki sur “download through your browser” butono aŭ ligilo en la mezo de la ekrano.

La lasta bulteno ankaŭ legeblas surrete, se vi klakas sur la kovril-bildo de la bulteno kiu troviĝas sube.

La bulteno kovras periodon de ses monatoj, do ĝi aperos dufoje en unu jaro (januaro kaj julio). En la komenco ĝi enhavos nur la kopiitajn artikolojn jam aperigitajn en ĉi tiu retejo. Sed povas esti ke oni verkos kaj sendos originalajn verkaĵojn aŭ tradukaĵojn, kiuj spegulas la kulturon de onia lando, ni ilin kun plezuro publikigos en nia bulteno.

Se vi havas anoncojn pri Esperanto en via lando, vi povas sendi ilin rekte al ni per retpoŝto, en Esperanto aŭ en Esperanto kaj via landa lingvo, por ke ni aperigu ilin en ĉi tiu retejo. Poste ili ankaŭ aperos en la sekvanta MONA Bulteno.

Sekvu nian retejon
Enskribiĝu per via retpoŝtadreso por sekvi nian retejon kaj ricevi retpoŝte la novajn blogaĵojn.

Sekvu kun 18 aliaj sekvantoj

Enter your email address

Sekvu nin

Kategorioj/Landoj

- Azerbaycan-Azerbajĝano (5)
- Հայաստան- Armenio (2)
- مصر- Egiptujo (8)
- საქართველო- Kartvelujo (6)
- INFORMILO (4)
- KOMISIONO (8)
- KUNVENO (6)
- MONA Bulteno (1)
- Türkiye-Turkujo (9)
- Uncategorized (2)
- فلسطين- Palestino (1)

La sekva EKO (numero 20) estos la lasta antaŭ la kongresoj, tiel ke la kongresaj komunikoj (Kongreso de HEA/ILEI, la Universala Kongreso, la Internacia Junulara Kongreso (IJK) portu numerojn kongruaj kun la ĝenerala numerigo de la komunikoj.

===== Vortoj = 710 =====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento nun tute ĝisdata ĝis 2018-14. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldona al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.